


PENSEO

N-ro 277

nov. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Seniluziiĝo

Kaj ŝi paŝadas sencele...
La maten' el bluaj plumoj
aperas per sunpetaloj,
kisante ŝiajn hararojn.

Kaj sencele ŝi marŝadas ...
Flugilhavaj flutoj kantas
kaj en tristec' estas ankro:
elreviĝ' en mara enigm'.



Juiz de Fora, 25/08/2014.



Bildo

Sur la blanka mur',
glitas velŝip' sur
river' blufarba.

Balanciĝas rigard'
sur tia insul'
el floroj, kiu fuĝas.

Poeto navigas
laŭ la ventovol'
el vortoj farita
silentkoloraj.


Juiz de Fora, 30/08/2014.

Anteo (Ĉinujo)



LOTUSFLORO

iuj prenas ĝin por sankto
dum iuj ĝin rigardas kiel tenton.
en la okuloj jam kadukaj
la floro vekas al mi prijunecan penton.



2012.10.30 - 5

mi forgesis sonĝi

hieraŭ nokte mi forgesis sonĝi.
ĉi-momente iom soifas la cerbo.
skajpumas mi kun freŭdo tajpe:
ĉu temas pri sek-sumo eĉ vakua la acerbo?

2012.10.31 - 12


efiko de famuloj

bufo iĝis luno iunokte;
ekvaloras lia feko pli ol oro.
hirta la hararo kaj ĉifonoj disvastiĝas
kaj favofungoj sur la pugo, kiel morkoloro.

2012.11. 1 - 2

la tempo

fluante inter niaj fingroj el ostoj kaj karno,
sunlumo sible iĝas diamantoj aŭ sableroj.
en la tombo de la tempo konstruata,
ni mortante vivas kiel traboj aŭ pajleroj.



2012.11. 1 - 20

Mori (Usono)



Aforisme

Kiu sian valoron
bone konas,
alies rekonon
ne bezonas.

**

Nur tiu liberiĝas
el kaĝo,
kiu agas kuraĝe
laŭ saĝo.

**

Inter homo kaj
Dio,
la vojon baras
religio.

**

Por la homara
prospero,
necesas just'
kaj libero.

**

Socia just'
kaj politika liber'
kreas paradizon
sur la ter'

**

Kie libero ekzistas
sed mankas justo,
la liberon baldaŭ
kovras rusto.

**

Nur tiu rajtas
blinde sekvi
aliulojn,
kiu mem ne havas
vidpovajn okulojn.

**

Azeno estas ankoraŭ
azeno,
eĉ se ornamita per
ora ĉeno!

**

Malantaŭ ĉiu granda
ago,
estas granda
imago.

**

Por ke homo
estu homo
ne sufiĉas
homa nomo!

**

Amiko
kun malbona politiko
pli danĝeras ol
Malamiko!

**

Tiu al kiu mankas
ŝuoj
ne zorgas pri ĝiaj
truoj!



Paŭlo Silas (Brazilo)



ŜTELISTO

Sur piedpintoj vi eniris lokon.
Dum noktomezo, dum silentis koko.
Se viajn paŝojn ni ne aŭdis tiam,
Al tio helpis ke, en ni, pasi', am'


Kaŝiĝis tiel histofunde, karne,
Ke niaj koroj restis senalarme.
Ego' profundlokita vidis ĉion.
Ĉu en surfac' aperas tia ĉi kon'?

Vi utiligis erare, en kred' mis-
Komprena, niajn kor-koordinatojn;
Kaj mokis kiam ni klarigon petis.

Per fid' perfidon vi plej superis!
Honestosenton kaj respekt-agadojn
Subtila manomov' dumnokte ŝtelis.



Catherine B. Krause (Usono)




Barbulo

I
la suno fortiras sin
mal
rap
id
e
kaj oni sentas
l' alvenon
de la nokta ĉaro.

II
barbulo,
vi marŝas senmorta
tra la epokojn,
sed kiu estas vi?
ĉu vi volas ion? saluton!
ĉu vi simple fantomas nin,
aŭ ĉu via resto tenas nin
tie, kie ni estas?

III
la pluvo frapadas nin
unu
tor
ent
e
oni forkuras
la malbenon
de kolera maro.



Siv Burell (Svedio)



Enprizonita

Se krimulo estas viro,
enprizonita dum kelkaj jaroj
ĉiam okazas – al mia miro –
ke venas leteroj de virinaroj.

Eble la danĝero logas ŝin
esti rilata al tia viro.
Aŭ ŝi volas savi lin
per kristana diro.

Se krimulo estas virin',
neniam okazas la sama.

Ŝi neniam ŝajnas diin’,
Nur virin’ fifama.

Kial oni maljuste juĝas,
la du pro sama krim’?
Okazas ke la penso fuĝas,
sed haltas je malnova lim’.



Ilustraĵo de la aŭtoro mem

Ronaldo Bôscoli

kaj Roberto Menescal

Barketo

(kantteksto)

La lum' de l' tag', la gaj' de l' sun',
kaj barketo laŭ la flu', sur la mara mola blu'.
Someras jam, amor' kaj am'
en barketo laŭ la flu' de la brizo por ni du.
Ja sen intenc' tujas komenc'
de kanzon' kvazaŭ el mar', kaj la sun'
estas reva kis'.
Bluĉiel' sen mis'!



Reen al ter', subir' de l' sun'
Kaj l' barket' en glita kur'
Kaj la volo kanti, nur!
Blu' en ĉiel', insula bel'
Kaj l' barketo estas kor'
Glite laŭ kanzono for
Ĉi-ĉio en pac' dum reven'
Kun trankvilo de somer' kaj vesper'
La barketo jen
Laŭ vesperseren'
La barketo jen
Laŭ vesperseren'

Tradukis



Ŭel Roŝa (Brazilo)

Tri folioj, panjo

(popolkanto)

Tri foliojn, panjo,
havas la arbet',
Unu sur la branĉo
du ĉe la pied'.
Du ĉe la pied',
Du ĉe la pied'.

Agnesa, ho! Agnja kara, he!

Ilin tuŝis vento
Ili tremis, jes.
Ilin tuŝis vento
Ili flirtis tre.
Ili flirtis tre.
Ili flirtis tre.

Agnesa, ho! Agnja kara, he!



Verdas plu la arbo,
sed la branĉo ne.
Dume sub la ponto
akvo muĝas, ve.
Akvo muĝas, ve.
Akvo muĝas, ve.

Agnesa, ho! Agnja kara, he!

Tradukis




Svena Dun (Hispanujo)

Joachim Ringelnatz



La espero

Tro grandas al la homoj respekt',
se tiu trone ĉielas,
ni pro malsaĝ' - aŭ tim' aŭ neglekt'-
ne vidas, ke sube pelmelas.
Ni fidas maltroe al apudul'.
Ni revas maltroe maldorme.
Facile vivi pli povus ni
per interhelp' konforme.
Ni devus esti pli mem laŭ rekon'.
pro beste pia rezono.
Je la plej pompa tomboŝton'
montriĝas tiom da bono.
Min tentas eĉ ne iom la em'
la temon plu nun disvolvi.
Problemojn havas ja ĉiu mem
kaj eblojn ilin solvi.



En la parko

Ĉe eta arbet' staris kapreolet'
en reva beat' en kviet',
je l' dudektria kaj du.
Je la kvara de fest'
mi revenis en fru'.
Jen plu revis ankoraŭ la best'.
Mallaŭte mi iris - sen spir' kun diskret' -
kontraŭ la vent' ĉe l' arbet'.
Mi tuŝis la beston je unu heliks'.
Jen ĝi estis el gips'.

tradukis



Cezar (Germanujo)

William Shakespeare



Mi Timon Sentas

Vi diras ke vi amas pluvon,
sed vi en pluvo malfermas ombrelon.
Vi diras ke vi amas sunon,
sed vi ŝatas ombron pli ol sunhelon.
Vi diras ke vi amas venton,
sed vi fermis fenestron kiam ventas.
Nun vi diras ke vi amas min,
konsenkvence kial mi timon sentas.

Esperantigis



Guozhu (Ĉinujo)

2014-10-16

Sali Bashota



La malbenita domo

Estas ie Malbenita Domo
Kun sep pordoj
Ĉiu pordo
Havas ĉesojle ŝtonon-dornon
Sangumitan dum jarcentoj

Neniu malfermas ĝin
Nek profunde endormigu
La timon alkroĉitan interne
Sur ties sep fenestroj
Vekriadas pnur unu kukolo
Nokton oni ne forgesendas
Nek la infanoj vidi tristajn sonĝojn
Ne endas
Estas ie Malbenita Domo
Kun sep pordoj
Kiu ne atendas homan manon

La birdo je aŭtuna profilo

Se oni mortigas tiun birdon
Je aŭtuna profilo
Kion mi aldiros la patrinon
Matene kiam vekiĝas la infanoj
Tintas la murhorloĝo
Kaj la patro trinkas la doloron de miaj
poeziaĵoj
Neniam ni aŭdas la paŝojn
Sur la renversita koro
Nek la lastan malbenon de la kanzono
Kiu ritme le epokon vekas enpace
La paŝojn premantaj la tagmezon
La ruĝiĝintaj stratoj paciencplene
Pro la entombigita silento en la ĉielo
Kaj pro ĉi tiu taga kampano ne ĉesanta
Se oni mortigas tiun birdon
Je aŭtuna profilo
Ĉu la patrino
Kovros mian animon per sunfloroj
La sangon per iom da printempo
Kaj noktomeze kiam mi vekiĝas delire
Ĉu la patrino

Enŝaltu la sorĉan lampon

Enŝaltu la sorĉan lampon
Sanktigita mano
Vian langon estas suĉantaj la araneoj
Enŝaltu la sorĉan lampon
Ke ni vidu la belajn okulojn
Ĉi tie prudente ni ne povas morti
La sorĉan lampon enŝaltu
Alie la paŝon ni mortigos
Kiel dum kvincent jaroj

(ĉiuj el la libro "La birdo je aŭtuna profilo", 1989)

Esperantigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Korvo kaj vulpo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ricevis
korvo ĝojplene
fromaĝpecon de l' Dio,
flugis kun ĝi buŝtene
al arb' serene.

Jen vulpo
kuris pretere.
La fromaĝa bonodor'
alblovis ventlivere,
tentis lin vere.

La vulpo
gapis avide
al la korvo sur arbo.
Li jam naskis inside
planon decide.

Ruzeme
li al la abi'
iris kaj svingis voston

kun ŝajniga emoci'—
sed, fakte envi'.

La vulpo
diris miele:
"Kara trezoro, vere
vi ja aspektas bele
ŝajne anĝele.



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Vi havas
staturon belan,
mirindan okulparon,
kaj plumaron fabelan
ja blanke helan.

Vi certe
pepas arie.
Kantu, kara fratino,
tuj kantu melodie,
kantu pasie."

La korvo,
multe sorĉite
de la mielaj vortoj,
malfermis senhezite
buŝon kvivite.

Pum! Falas
teren la fromaĝ'.
La vulpo tuj buŝprenis
ĝin, forkuris kun kuraĝ'.
Ho, kia domaĝ'!

adaptita el fabloj de Krilov

Jadranka Miric (Serbujo)



"ĜOJO DE EŬROPO"

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Infanoj
kaj eŭrop-ĝojo.
Internacia festo.
Longe serĉata ĝojo,
la esper-vojo!

Feliĉo
kaj kontenteco!
Jen, infana inundo
surstrate amikeco
floras boneco.

Filtretas
naciaj flagoj.
Mano en mane lude
oni marŝas dum tagoj
kun bonreagoj.

Agrablas
esti surstrate,
kanti kaj danci grupe.
Dorlotiĝi ĉu kate,
infane sate!

Juneco
kaj pensiuloj.
Renkonto promesita !
Kreantaj hereduloj
por samtempuloj.

Viktoro (Ĉinujo)

Disiĝo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Vi arbo
estas, kaj mi vent'.
Kvankam ni havas ŝancojn
babili kun gaja sent'
en ofta renkont',

kaj amon
inter vi kaj mi
ni deziras sincere
jen brulante de pasi'
sen ajna raci',

ni tamen
per eterna am'
kunligiĝi ne povas,
ĉar nur daŭras ĝia flam'
efemere jam.

La vento
ĉiame per blov'
flugas tien kaj tien,
dum arbo sub ĝia ŝov'
foriras sen pov'.



Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Lily (Ĉinujo)

Fortika sed malforta

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Jam
la antaŭludo de am'
sufiĉas
por amora flam'.

Li
tordas sin kun ĝema kri',
fuŝpalpas
preskau sen raci'.

Pez'
de lia korpo per lez'
subpremas
min jen ĝis frenez'.

Per
mola man' mi kun tener'
avide
palpas kun esper'

ĝis
lia erekta penis'
karese
per la fingra kis'.

Sed,
ho ve, je mia malkred'
ĝi mincas
kiel cigared'.

Kun
giganta korpo en brun'
fortikas
li vane jam nun.

Kok'
lia kiel salikok'
molkurbas
ja je mia ŝok'.

Tre
multe mi ĉe apoge'
suferas
pro lia pane'.

Jen
mi ĝemas kun kora splen'
ba, vane
malgraŭ mia pen'.



**Dekses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Andrej Pozdnjakov

Onklino Roza

Mi kreskis en ordinara familio, laŭ nia mezuro, laŭ mezuro de kazaĥia provinco, mi estas preskaŭ generacia inteligenciano. Ho! Panjo estas librotenisto, paĉjo estas juristo. Ambaŭ ili laboris en uzino, en preskaŭ ĉefa uzino en urbo. Ili ricevis sufiĉe bonan salajron. Kvankam pri tio, ke saĝa librotenisto kaj bona juristo kostas pli multe ol 200 rubloj de modelo de 1961 dum monato, miaj gepatroj komencis konjekti sufiĉe malfrue. Dum sovetia tempo eĉ alilandaj filmoj kun aktoroj-intelektuloj, kiuj parolas al siaj okazaj amikinoj: "Mi estas juristo, bebeto!" (okazaj amikinoj kutime pro tiuj vortoj iĝis cedema kiel modlopasto), ne meditigis ilin pri iuj pensoj. Sed ĉu? Ili loĝis kiel ĉiuj homoj: aĉetis multkoloran televidilon "Rubin" (bona televidilo!), vojaĝis al Hungario kaj al Ĉeĥoslovakio, havis infanojn vestitajn kaj piedvestitajn. Ĝenerale ili norme vivis, pro maljusta salajro ne maltrankviliĝis. Mi bonokaze memoras, kiam por nia familio eksonoris "unua sonoro", kiu informis pri veno de nova tempo kaj nova realo, en kiuj juristoj kaj librotenistoj estas tre multekostaj…

En sovetiaj jaroj oni kutime rilatis al laboristoj de vendado kun estimo kaj kun malrespekto samtempe. Ĉar precize la laboristoj administris distribuon de tiel nomata "deficito", ĉefa ideo de sovetia tempo. Vendado estis celtabulo de karikaturoj en satira revuo "Krokodilo", kaj multaj homoj serioze konsideris, ke precize "fivendistoj" malhelpis konstruadon de komunismo en aparta lando. Laboristoj de vendado vivis per sia apartigita vivo, ili malofte allasis al sia vivo fremdulojn – pli ofte ili estis "tre necesaj" homoj: bonaj kuracistoj, aŭtoseruristoj… Miaj gepatroj neniam estis "necesaj homoj", kaj sola konata vendistino ĉe ni estis Klavdija Vasiljevna, la administranto de fako de alilanda literaturo en centra libra vendejo. Panjo pro tio konigo nemulte sentis embarason. Sed patro, la pasia leganto kaj bibliofilo, dum tempoj de totala deficito estis devigata donaci kiel dankon pro ia "Grafo Montekristo" al tia grava persono ankaŭ deficitajn skatolojn de bombonoj al la 8-a de marto[1] kaj al Nova jaro. Kaj li estis devigata organizi laŭ sindikata uzina linio turisman vojaĝon al "preskaŭ kapitalisma" Jugoslavio… Ĉu eble tion ne patro organizis sed iu alia kunfrato-libramanto? Mi malŝatis tiun Klavdija Vasiljevna. Mi eĉ precize memoras pro kio. El mia nomo, Andrej, ĝenerale malfacile fari ĵargon-arogantan derivaĵon. Eĉ "Andrjuĥa" sonas ne tiel familiare kiel "Serjoga" kaj "Toljan"[2]. Sed Klavdija Vasiljevna "kreis" por mi novan nomon kaj nur per la nomo nomis min… "Ondrja", tiel ŝi nomis min, ĉu vi povas imagi?

– Ĉu, Ondrja, vi ellernis ĉefurbon de Liĥtenŝtejno? – kun falsa kortuŝeco ŝi demandis kvinjaraĝan min. Starante apude patro kulpe ridetis, kaj mi kiel plej bonedukita infano en mondo klinis kapon kaj mallaŭte parolis:

– Je-e-es, Vaduzo…

Mi ne povis diri al ŝi, ke mi ne devis iel aparte lerni ĉefurbon de Liĥtenŝtejno, ĉar unu el plej ŝatataj ludoj en mia infanaĝo estis rampi kun patro sur mapo de mondo, metita en planko, kaj trovi “menditajn” per patro arkipelagojn, lagojn kaj kabojn. Mi ĝis nun vide memoras, kie proksimume situas Ŝetlandaj insuloj kaj golfo Moskitos. Des pli mi sciis tiajn bagatelojn kiel ĉefurbojn de ŝtatoj de mondo…

Estis verŝajne 1989 aŭ 1990 – mi adoleskis, kaj ŝi ne demandis plu min pri ĉefurbo de Liĥtenŝtejno. Des pli aktualeco de konigo kun ŝi nemulte malpliiĝis, ĉar anstataŭ “administrantoj de varo el libraj vendejoj” venis “skarabetoj”, kiuj tute malkaŝe vendis popularajn literaturojn en ĉiu dimanĉo apud loka Palaco de Kulturo de Fervojistoj. Pro iliaj prezoj certe oni volis plori, sed patro tamen de tempo al tempo alportis en sia paperujo paron de popularaj libroj el libra bazaro. Me eĉ memoras, ke mi “kovris” lin kontraŭ panja kolero – ekzemple per ia interparolo mi foratentigis ŝin, dum patro mallaŭte dismetis siajn aĉetaĵojn al grandegaj libraj ŝrankoj, kiuj estis ĉefaj aĵoj de meblaro en nia hejmo… Klavdija Vasiljevna tiam vizitadis nin tre malofte, kaj al ŝi en vendejon ni venis sencele – por ke subteni konigon, sed ne esperante trovi vican kaŝitan sub vendotablo libran deficiton. Amikeco kun administranto de fako de alilanda literaturo, kiu subite perdis sian memfidon, pasis al malpliiĝo. Tial ni miris pro ŝia telefona voko en unu el aŭtunaj dimanĉaj tagoj. Klavdija Vasiljevna petis permeson gasti al ni kun sia amikino – ŝi bezonis juran konsilon de mia patro.

Amikinoj venis vespere. Dua gasto estis malgranda kaj dika kazaĥino, ŝia nomo estis Roza. Nu jes – estas ĉe kazaĥoj tiaj belaj nomoj, verŝajne iu memoras kantistinon Roza Rimbajeva, ŝi estis tre populara. Roza (por mi, junulo, ŝi certe estis “onklino Roza”) estis tre simplanima kaj brua, al ni ŝin alkondukis familia dramo, kiu estis inda al Ŝekspira plumo. Antaŭ du semajno ŝia patro mortis, kaj frato de onklino Roza malice ŝtelis ĉiujn dokumentojn de lasita heredaĵo: aŭto, loĝejo kaj cetera simpla kolekto de materialaj multvaloraĵoj. Propre de mia patro ŝi bezonis konsilon – kion devas fari “viktima flanko”, por ke justo triumfos. Patro dediĉis al onklino Roza tutan vesperon preparante perjuĝajn postulojn al juĝo kaj aliajn jurajn dokumentojn. Niaj gastinoj forveturis jam per taksio preskaŭ en dekdua horo de nokto.

Post semajno Klavdija Vasiljevna ree elpetis gasti al ni kun onklino Roza. Ree tuta vespero okazis ĉe gazeta tableto en gastoĉambro en ĉirkaŭumo de tasoj da kafo, plenskribitaj folioj kaj dikegaj libroj, kiuj koncentrigis al si ĉiujn sekretojn de sovetia juro… Ankoraŭ post semajno onklino Roza veturis jam sole, poste ree veturis sole kaj poste ree veturis sole… Ni jam komencis alkutimiĝi al tiu, ke en ĉiu dimanĉo al ni venas malgranda brua kazaĥino konstante plendanta pro sia malnoblulo-frato kaj pene perceptanta voĉon de mia patro, kiu konscience penis traduki ŝiajn plendojn en strikta jura lingvo.

Post tri aŭ kvar monatoj onklino Roza ree venis kun “amikino de nia familio”, Klavdija Vasiljevna. Ĉi-foje “klientino” de mia patro venis al ni kun danko – juĝaferon tute gajnis “nia flanko”, kun frato ŝi repaciĝis, cedinte al li “entute” aŭton, kaj ĝenerale suno de justeco finfine lumis en viva vojo de onklino Roza. Danko de ŝi estis simbola: granda skatolo de bombonoj kaj botelo da sufiĉe bona konjako “Kazaĥstan”. Ĝenerale tiam miaj gepatroj eĉ pensis pri neniu mono. Unue: ĉu pro kio ili devas ricevi monon? Ĉu pro deko de vesperoj kun kafo kaj kodo anstataŭ televidilo kaj angla krimromano aĉetita antaŭ du jaroj ĉe sama Klavdija Vasiljevna? Kaj due: ja ŝi estas amikino de nia bona konatino! Kia povas esti mono inter amikoj?! Ja ni neniom superpagis al “onklino

Klava”[3] pro libroj, ŝi simple lasis por ni unu ekzempleron, kaj patro jam poste pensis, kiel li devas danki ŝin… Ankaŭ, se paroli honeste, mi pensas, ke socia statuso de onklino Roza konfuzis miajn gepatroj por ke simple peti ĉe ŝi monon – onklino Roza estis entute laboristo de metiejo de kemia purigo en loka Domo de Vivmaniero. Kia ĝi estas profesio – laboristo de metiejo de kemia purigo? Jen mi en infanaĝo revis iĝi inĝeniero-aviaprojektisto, mia onklo estis milicano, sed en kiu instituto aŭ almenaŭ teknika lernejo oni instruas akcepti malpurajn paltojn kaj jakojn kaj poste akurate detranĉi de ili butonojn kaj metalajn fermilojn?..

Do juĝaferon oni gajnis, konjakon oni drinkis, kaj bombonojn oni ŝparis “ĝis festo”, sed ni eĉ ne povis imagi, ke rezervo de danko de onklino Roza estas tute ne elĉerpita, kaj tiu danko estos sekvo precize de tiu socia statuso, kiun kun tiu naiveco akceptis miaj gepatroj kiel ne tian solidan…

Foje en sabato sonoris telefona voko. Mi levis aŭskultilon.

– Hola! Ĉu Andrej? Voku panjon, tio estas onklino Roza, – rapide informis aŭskultilo. Kazaĥoj havas interesan manieron paroli – rapide kaj kun intonacio, kiu tre similas demandan intonacion. Rusoj ankaŭ tiel parolas, mi mem liberiĝis el tiu prononco nur post du jaroj de loĝado en Rusio, kaj ĝis nun mi povas sen peno determini laŭ prononco “gastojn el patrolando”.

– Aĥ, grandegan dankon al vi, Roza! – tre sincere diris mia panjo aŭskultinte aŭskultilon kaj turninte sin al mi, – Prepariĝu, Andrej, veturu al vendejo “Ĝasibaj”, trovos tie vendistinon Asel, ŝi donos al vi tri kilogramojn da sukero, – ŝi diris.

Mi memorigas, ke estis 1989 aŭ 1990, en horizonto kiel Karakuma[4] miraĝo vidiĝis programo de transiro al merkata ekonomio kun nomo “500 tagoj”, pro tio el vendejoj impete malaperis eĉ plej ordinaraj manĝaĵoj kaj varoj, kaj popolo amuzis sin per trarigardo de kongresoj de popolaj deputatoj kaj per ĉiusemajnaj televidaj sorĉadoj de psikoterapiisto Kaŝpirovskij. Tri kilogramo de sukero estis ne superflua por familio, kiu ricevis sovetian normon da kvar kilogramojn (laŭ kvanto de manĝantoj) ĉiumonate. Tial mi sen superfluaj vortoj vestis sin kaj veturis en tute ordinara gastronomia vendejo en iu “ne nia” distrikto serĉi vendistinon Asel.

Post semajno ĉe ni ree sonoris telefono.

– Andrej, saluton! Ĉu panjo estas en hejmo? – demandis min tumultema onklino Roza. Ĉi-foje panjo ne estis, kaj la kazaĥino ĉagrenis: – Oj, kiel estas bedaŭrinde… Sed ĉi tie en vendejo “Ajgul” por vi mi preparis sapojn. Ĉu eble vi prepariĝos, aliros?

Mi en tiu tempo estis junulo, kiu bone sentis ekonomian konjukturon, tial oni ne devis longe peti al mi aliri al granda ĉiovendejo trans du kvartalo de nia domo por dua sovetia deficito de tempoj de reorganizo. Vendistino Saule (onklino Roza nomis ŝin Sauleŝka), kiel oni promesis, vendis al mi kvin pecojn da “La fraga” sapo.

Ankaŭ post semajno mi ree veturis en iu vendejo en mala fino de urbo por ke aĉeti sen ajnaj kuponoj unu kaj duonon da litro de heliantoleo ĉe vendisto Serik. Kaj poste mi veturis ankoraŭ ien – ĉe junulino Ajgul mi povis aĉeti lavan pulvon “Lotuso”… Pli multaj varoj iĝis deficitoj – laŭ kuponoj kaj strikte limitite oni komencis vendi duonŝtrumpojn, tabakon, teon, grion (kiel sukcesis – pli ofte oni povis aĉeti miligrion aŭ avenan grion, ial fagopira grio en nia regiono iĝis rara delikataĵo ankoraŭ en 70-aj jaroj), makaronion… Afero atingi ĝis tio, ke en Loĝa-Ekspluataj Komitatoj oni komencis doni “numerajn” kuponojn – en ĉiu monato loĝantoj devis legi en loka gazeteto, kion precize oni donos laŭ kupono №5, kaj kion laŭ kupono №7. Sed definitive mi komprenis, ke

al sovetia potenco venis " trindec"[5], kiam el niaj vendejoj malaperis salo. En urbo, kiu situas en salaj lagoj, tio akceptiĝis simbole – precize tiam aperis anekdoto pri kuponoj je sablo por loĝantoj de Saharo, kiuj (kuponoj) devos iĝi unua rimedo de komunistoj en okazo de veno al potenco en Norda Afriko.

Ni ankaŭ kaj ĉiuj loĝantoj dum tutaj tagoj impetis el CUM (Centra Universala Magazeno) al "Ĉiovendejo", el vendejo "Progreso" al vendejo "Sciureto" provante uzi multkolorajn paperetojn (kuponoj tiam estis pli grave ol tiuj paperetoj, kiuj nomiĝis monoj). Sed por ni estis nemulte pli facile, ĉe ni estis onklino Roza. Kaj duonŝtrumpojn (ili ne havis koloron kaj eĉ dimension, ili estis "simple duonŝtrumpoj"), kaj teon (ĝi ankaŭ, se paroli delikate, estis ne firmaa produkto), kaj makaronion, kaj stufaĵon ni iufoje super limito akiris per vendistoj Kajrat, Asamka, Sauleŝka – tiuj multaj konatoj de la laboristino de metiejo de kemia purigo. Bonokaze iniciato ĉiam devenis de onklino Roza.

Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Ĝenerale ni travivis iel "gorbaĉjovan[6] malsaton" – eĉ ni faris netuŝeblan rezervon, ĝin ni konservis ĉe ni en gastoĉambro en grandega ŝranko. Lastan ladvazon da stufaĵo el tiu rezervo mi manĝis, kiam mi jam iĝis studento de Novosibirska Universitato, en 1994, sed iajn "supojn de strategia celo" en malpuraj paperaj paketoj gepatroj elĵetis antaŭ transloĝiĝo al Rusio.

Bonokaze patro denove sukcesis kunlabori kun onklino Roza en mezo de 90-aj jaroj. Li helpis ŝin korekte legitimi rajton de propraĵo je la sama Domo de Vivmaniero. Verŝajne ŝi ĝis nun estas ĝia mastrino. Sed tiam certe mia patro konsilis ŝin pro mono – ja tempoj ŝanĝiĝis!

Notoj:

1. *La 8-a de marto* estas virina festo en Sovetio. Nun la 8-a de marto estas virina festo en Rusio kaj en multaj respublikoj de estinta Sovetio.
2. *Andrjuĥa, Serjoga, Toljan* estas ĵargonaj formoj de rusaj viraj nomoj: Andrej, Sergej, Anatolij.
3. *Klava* estas malplilongigita virina nomo Klavdija.
4. *Karakumo* estas dezerto en Centra Azio.
5. *"trindec"* estas rusa ĵargona vorto, kiu signifas finon, detruon.
6. *Gorbaĉov* estas gvidanto de Sovetio en lastaj jaroj de la lando.

Esperantigis

Igorj Ĥomjakov

(Rusio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ http://gazetejo.org/eo/penseo
◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_